

## Proveksameno

### Skriba parto

#### Dictée – Diktaĵo (10 poentoj)

Survoje Ciruso renkontas sian amikon Hektoro. Ĉi tiu kondukas ĉevalĉaron peze ŝarĝitan per multaj sakoj. Ciruso demandas pri la naturo de tia transportaĵo. Tiam Hektoro alproksimiĝas kaj flustras kvazaŭ sin kaŝante: « Aveno ! » Ciruso, mirigite, replikas: « Nur tio ! Kial do vi ĝin diras tiel mallaŭte ? » Kaj Hektoro, same diskrete, klarigas: « Ĉar mi ne volus, ke ĝin aŭdu la ĉevalo. »

#### Gramatikaj ekzercoj

##### Remplir chaque trou par la terminaison ou le mot convenable – Plenigu ĉiun truon per la konvena finaĵo aŭ vorto (10 poentoj)

« Mi ne scias, ke vi loĝas ti... », diris Ana al ... amiko Marko. « Do ti... domo esta via : Kiel bela ... estas ! Mi demandas min, ... mia domo estas ... granda ol la via ».  
– « Bonvolu eniri en la dom... kaj viziti ... », respondis Marko. « Vi konstatos, ke mankas neni... . El la kvin ĉambroj, la pl... granda estas la manĝoĉambro ».

##### Cocher la réponse exacte – Marku la ĝustan respondon (10 poentoj)

Mi timas, ke morgaŭ ...

pluvos       pluvus       pluvu       pluis

... da pano vi volas ?

kion       kiom       kiun       kiujn

Mi malbone vidas ... mallumo.

per       por       pro       pri

Johanino opinias, ke ... edzo tro multe laboras.

ŝia       sia       lia       ĝia

Ne ĉio, ... estas multekosta, estas bela.

kiu       kio       ke       kia

#### Skriba kompreno

Texte simple à lire et comprendre. Répondre ensuite à cinq questions sur ce texte – Teksto facile legebla kaj komprenebla. Poste respondi kvin demandojn pri tiu teksto (20 poentoj)

##### Atente legu tiun tekston

Post la kongreso de Barcelono en 1909 mi enskribiĝis kiel studento de lingvoscienco en la Pariza Universitato, en la Sorbonne, kaj fariĝis la plej juna membro, de la Franca Societo de Lingvistiko. [...]

Tiam mi estis nur malriĉa studento, vivanta sub tegmento apud la Panteono kaj perlaboranta por mia ĉiutaga pano, donante lecionojn de latina lingvo al knabo de riĉa familio, kiu ne havis multan guston por lerni en liceo.

Per la mono tiel gajnita mi vivis modeste ĝis la tria semajno de ĉiu monato. Por la lasta semajno necesis manĝi tre ŝpareme. Feliĉe oni povis aĉeti ĉe stratangulo frititajn terpomojn por dudek centimoj en papera saketo kaj oni ĝojis se ili ne estis kuiritaj en la sama oleo kun la fiŝoj, odorantaj tro persiste.

Fine de ĉiu monato la eleganta patrino donis la koverton kun la bankbileto kaj oni denove povis iri al la restoracio unu fojon en la tago.

El Edmond PRIVAT (1889-1962), *Aventuroj de pioniro* (1962)

### **Respondu tiujn kvin demandojn per kvin kompletaj frazetoj**

1. Kie kaj kiam okazas la faktoj ?
2. Klarigu, kio estas « la ĉiutaga pano » ; « stratangulo ».
3. Respondu ĉu la jenaj asertoj estas veraj aŭ malveraj, kaj pravigu viajn respondojn :
  - a) La rakontanto estas liceano el riĉa.
  - b) La rakontanto manĝas ĉiutage unu fojon en restoracio.
  - c) En tiu epoko, oni povis aĉeti sur la strato frititajn fiŝojn.
4. « Fine de ĉiu monato la eleganta patrino donis la koverton kun la bankbileto » : Pri kiu bankbileto temas ? Kiu estas tiu « patrino », kaj kial ŝi donas tiun koverton al la rakontanto ?
5. Kial okazis, ke la frititaj terpomoj havis malbonan guston ?

## **Parola parto**

### **Texte à lire à haute voix – Teksto laŭte legenda**

Multajn ecojn de usona karaktero mi admiris kaj ŝatis, aliajn ne. La gastameco kaj amikeco al la gastoj estis ĉarma. La egaleco inter viroj kaj virinoj en publika vivo tre plaĉis al mi, sed la rasistaj antaŭjuĝoj kompreneble ne povis plaĉi al juna zamenhofano.

La nigrulojn mi trovis ĝenerale amindaj. La knabeto en la lifto kun sia ruĝa ĉapo kaj kora rideto montranta gaje blankajn dentojn estis kuraĝiga familiano donanta bonhumoron en la mateno. La ĉina kuiristo aŭ lavisto de ĉemizoj fariĝis amiko, ne nur por mi sed por multaj usonanoj mem.

Kiam mi poste revenis Eŭropon la bonkora, bonhumora ĉeesto de la nigruloj vere mankis al mi poste, kaj mi ĉiam akre suferas, kiam mi aŭdas pri krudaĵo aŭ maljustaĵo kontraŭ ili.

El Edmond PRIVAT (1889-1962), *Aventuroj de pioniro* (1962)

### **Répondre à dix questions : 5 de compréhension et 5 de grammaire ou de vocabulaire – Respondi dek demandojn, 5 pri la kompreno, 5 pri la gramatiko aŭ la vortrezoro**

1. Klarigu « kuraĝiga »
  2. Anstataŭigu « mi revenis Eŭropon » per esprimo, kiu entenu prepozicion.
  3. « aliajn ne » : Refaru la frazon, remetante la mankantajn vortojn.
  4. Klarigu « antaŭjuĝoj ».
  5. Klarigu la uzon de la sufikso « ano » en la jenaj vortoj : « zamenhofano » ; « familiano » ; « usonanoj ».
  6. Pri kiu lando parolas la rakontanto ?
  7. Kion li precipe ŝatis aŭ admiris en tiu lando ? Kial ?
  8. Kio specife malplaĉis al li ? Kial ?
  9. Kiujn metiojn faris la nigruloj, kiujn renkontis la rakontanto ? Kiujn metiojn faris la ĉinoj ?
  10. Ĉu la rakontanto ŝatas aŭdi pri maljustaĵoj kontraŭ la nigruloj ? Kial ?
- [...]

### **Lecture instantanée d'expressions numériques (senprepara lego de numeralaj esprimoj)**

Sabaton, la 28-an de januaro 1997 ; 100 000 eŭroj ; Strato L. Zamenhof 27 ; 188 ; la 25-a horo.

### **Commentaire d'un document iconographique**

Voir les documents joints.